



Gerrit Berveling <i>En la grandurbo</i>	uverturo	59
Giorgio Silfer <i>Endre Ady kaj la aliaj: esperanto por hungara progreso</i>	eseo	60
Endre Ady (Giorgio Silfer) <i>Hungara problemo</i>	hung. literaturo	63
Ivo Andrić (Antoniĵe Sekelj) <i>La ponto super Drino</i>	datreveno	65
Marie France Conde Rey <i>Malgraŭ funebro kaj timo</i>	komikso	68
Zlatoje Martinov <i>Vivanta lingvo, vivanta popolo</i>	intern. kolokvo	71
Sabine Fiedler <i>Frazeologio kiel pruvo de esprimriĉeco de lingvo</i>	lingvistiko	72
Zdravko Seleš <i>Lumo sen ombro</i>	eseo	77
Carlo Minnaja <i>Granda, sed forges...ito</i>	zamenhofologio	82
Giorgio Silfer <i>Se Alois ne pardonas... du filmoj pri Alzheimer</i>	kino	84
Leif Nordenstorm <i>La mormona kredo ke Jesuo estis en Ameriko</i>	religio	86
Vinko Ošlak <i>Kosmopolitoj kaj uranopolitoj (2)</i>	zamenhofologio	88
Fabrizio A. Pennacchiotti <i>Eventuala araba fonto de Dekamerona novelo</i>	mondliteraturo	96
Carlo Minnaja recenzas <i>De nenifaro al troimpeto</i>	en vitrino	100
Sara Spanò recenzas <i>Magia sinmalkovro</i>	en vitrino	102
Carlo Minnaja recenzas <i>Nepre leginda manlibro</i>	en vitrino	105
Esperanta PEN-Centro <i>Kreskanta aktiveco... kaj aĝo</i>	speciale PEN	106
Julian Modest <i>La revo de Vaska</i>	rakonto	108

En la grandurbo

de Gerrit Berveling

Hieraŭ mi piediris,
promenis arbare, en nia grandurbo,
iom legis,
kaj trinkis teon kun freŝaj mento
kaj mielo.
Hieraŭ estis bona tago
preskaŭferie.

Hieraŭ neniun konaton
mi vidis. Nur fremdulojn
amase. Tipe grandurbe.

Kiam mi promenas,
kompreneble ĉiam
la tornistron mi kunportas
minimume kun kvin libroj.

Unu libro apenaŭ libras.
Ankaŭ ja Moseo
Sian Kvinlibron havas.

Tamen ne grandurbe
li promenis,
nur dezerte.

Meze
de nia grandurbo
troviĝas
malsovaĝa sed bela
arbareto. Kun kafejo,

kie freŝan menton
kun mielo mi ĝuis
en mia teo.

Sed ĉio ĉi ne gravas,
ne eĉ decas en poemo.

En poemo
decas nur seriozaĵoj,
decas sufero, decas
prezaltiĝoj, decas
inflacio, militminaco, strikoj.

Ĉu en poemo
decas promeni grandurbe?
Aŭ ĉu prefere dezerte?
Sed kie,
ho kie, en ĉi grandurbo
kie trovi dezerton vere taŭgan?

Hieraŭ mi promenis,
tetrinkis,
legis en libro.

Meze de nia grandurbo
troviĝas malsovaĝa sed bela
arbareto. Kun kafejo,

Eventuala araba fonto de Dekameronano

de Fabrizio A. Pennacchietti

¹ La verko titoliĝas *Dekameronano* ("dektagaĵo") ĉar, laŭ greka etimologio, ĝi konsistas el dek rakontaj tagoj. Dum ĉiu tago prezentiĝas dek noveloj. Do sume la verko entenas cent novelojn. Ĝi estis verkata inter la jaroj 1348 kaj 1353.

² Giovanni Boccaccio, *Dekameronano. Unuaj tri tagoj*. Tradukis Perla Martinelli kaj Gaston Waringhien, eld. LFKoop, 1995.

³ En olda turka lingvo Alibek signifas "Sinjoro Alibek".

⁴ En la originalo: *Alibek divien romita, a cui Rustico monaco insegna rimettere il diavolo in inferno; poi, quindi tolta, diventa moglie di Neerbalo*.

1. La deka kaj fina novelo de la tria tago de *Dekameronano*¹, la ĉefverko de Johano Bokaĉo (Giovanni Boccaccio, 1313-1375), estas tre populara kaj vaste konata, kaj tio ĉefe dependas de ĝia senĝena malprudeco. Fakte oni povas ĝin taksi "elegante obscena". La novelo, kune kun la ceteraj noveloj de la unuaj tri tagoj de *Dekameronano* estas nun legebla en esperanto danke al la brila traduko de Perla Martinelli kaj Gaston Waringhien.²

La heroino de tiu ĉi rakonto nomiĝas Alibek (originale skribita Alibech), ekzota nomo kiu sonas turkeske.³ Ŝi estas 14-jaraĝa muzulmana knabino el la ĉemara urbo Kapso (nuntempe Gabés) en Tunizio. Ŝi estis ekstreme naiva virgulino, filino de riĉega viro kun multaj gefiloj. La novela rubriko eksplikas ke "Alibek fariĝas ermitino kaj monaĥo Rustiko instruas al ŝi reinferigi la diablon; poste, de tie forprenite, ŝi edziniĝas al Neerbalo."⁴

Se oni ankoraŭ ne komprenis pri kiu novelo temas, mi skizu resumeton.

Aŭdinte de kristanoj loĝantaj en sia urbo ke, en la egipta de-

zerto nomata Tebaido, monaĥoj en absoluta izoliteco sin dediĉas al la servado de Dio ĉar tio estas plaĉa kaj meritplena agado, Alibek decidis forlasi la mondon kaj ilin imiti. Tial, ne informinte siaj familianojn, ŝi fuĝis al Egiptujo kaj kun granda peno atingis Tebaidon. Tie, en la vastega dezerta ebenaĵo, ŝi rimarkis malproksiman dometon.

Tien veninte, ŝi trovis maljunan monaĥon. Li tre miris pro ŝia alveno kaj pro ŝia klarigo ke ŝi deziras lerni kiamaniere oni plene servas Dion. Li donis al ŝi iom por trinki kaj por manĝi (herb-radikojn kaj daktilojn) kaj invitis ŝin pluir ĉe alian pli sanktan monaĥon. Li fakte estis frapita de la freŝa beleco de la virgulino kaj timis fali en tenton.

Post longa piedirado Alibek atingis la duan monaĥon, sed li reagis same kiel la unua. Li konsilis al ŝi pluir al tria monaĥo, kies nomo estis Rustiko. Li estis pli juna sed li jam aliris pli altan ŝtupon en la asketa vojo al perfekteco.

Alibek konsentis kaj finfine, post plua longa piedirado, ŝi atingis la trian monaĥon.

Rustiko tre embarasiĝis pro la flora beleco de Alibek kaj ĉefe pro ŝia abisma naiveco. Li tamen fidis sian pene akiritan memregon kaj akceptis fariĝi ŝia instruisto pri asketismo. Iun nokton tamen la tentoj superfortis lin. Forlasinte preĝojn, bonajn pensojn kaj monakan disciplinon, li klarigis al ŝi ke la asketa vivo konsistas en daŭra batalo kontraŭ la diablo kaj ke ĉiu viro havas en sia korpo mem apartan specon de diablo same kiel ĉiu virino entenas en sia korpo apartan specon de infero. Kial ne forpeli lian diablon en ŝian inferon?

Alibek tre miris pri la dinamiko de tiu spirita ekzerco sed, fidante la asketan kompetentecon de sia instruisto, ŝi deklaris sin preta servi Dion en tiu maniero se ĝi estas efika por venkobati la komunan malamikon. Akceptite, farite. Finfine, tiu asketa praktikado ne ŝajnis al Alibek tro peniga; ĝi estis eĉ plezura kaj, krom tio, ĝi estis evidente efika ĉar la diablo ĉiun fojon venkiĝis. Ŝi ĉiel ne volis aperi pigrema en siaj asketaj devoj kaj tial daŭre kaj senlace petis la junan monaĥon ripeti la praktikon. Tio tamen evidentiĝis tro peza entrepreno por la povra ermito. Baldaŭ ĝi superis liajn fortojn kaj, malgraŭ ŝiaj protestoj, li rezignis.

En tiuj samaj tagoj en Kapso ekbrulis la domo de Alibek kaj ĉiuj ŝiaj familianoj pereis. Neerbalo, junulo el Kapso, serĉis ĉie Alibek, la solan heredantanon, kaj fine ŝin retrovis ĉe Rustiko, kaj kun granda ĝojo

de la monaĥo, li ŝin rekondukis al Kapso por edziĝi al ŝi.

Laŭ Vittore Branca, renoma nuntempa specialisto pri Bokaĉo, "magraj kaj svagaj, por ne diri neekzistantaj" estas la anteceditoj aŭ literaturaj fontoj de tiu ĉi novelo.⁵ Kaj fakte la diversaj provoj kiujn oni faris por eltrovi analogiojn kun aliaj malfruantikvaj aŭ mezepokaj rakontoj el la okcidenta, nome kristana, mondo restis sen konvinkaj rezultoj. Oni vidu ekzemple la klopodon de Alfonso Paoella starigi strukturan analogion inter la novelo de Alibek kaj la hagiografia verko *Vita S. Mariae Aegyptiacae* (Vivo de Sankta Maria Egipta).⁶ Valoras do la penon direkti la atenton al rakonto apartenanta al tute alia kultura horizonto, sed kiu tamen prezentas pli taŭgajn respondojn kun tiu dekameronano novelo.

2. Lastatempe, sekve de esplorado pri la orientaj manuskriptoj konservataj ĉe *Forschungs und Landesbibliothek* en Gotha (Turingio, DE), ekaperis relative malfrua araba kodekso kiu entenas plurajn islamajn legendojn: Ms. orient. A 2756. Inter tiuj legendoj troviĝas novelo kies titolo estas *Hadit al-gumguma ma'a l-malik* (Rakonto de la kranio kun la reĝo). Ĝi estas fabeleca rakonto tre simila al tiuj de *Unu kaj mil noktoj*. En ĝi enestas epizodo kiu ja meritas resumon pro ĝia eventuala afineco kun la novelo de Alibek kaj Rustiko. Krome tiu epizodo, kiel

⁵ Kp. Vittore Branca (editore), Giovanni Boccaccio *Decameron*, Torino 1980: Einaudi, p. 443, noto I.

⁶ Kp. Alfonso Paoella, *I livelli narrativi nella novella di Rustico ed Alibek 'romita' del Decameron* (La rakontaj niveloj en la novelo de Rustiko kaj Alibek ermitino), *Revue Romane*, 13 [1978], pp. 189-205. La "Vita S. Mariae Aegyptiacae" troviĝas en *Patrologia Latina*, J.-P. Migne (ed.), 1879, LXXIII, kol. 671-690.

oni tuj perceptos, prezentas arab-islamano reehon de intereso flanka evoluo de la biblia rakonto pri Suzano (*Danielo*, 13-a ĉap.).⁷

⁷ La araba teksto, aperanta sur la folioj 30a-44b de la manuskripto Gotha orient. A 2756, estis publikigita en la volumo: F.A. Pennacchietti, *Susanna nel deserto. Riflessi di un racconto biblico nella cultura arabo-islamica* (Suzano en la dezerto. Influo de biblia rakonto en la arab-islama kulturo), Torino 1998, Silvio Zamorani Ed., 125 p.

⁸ Kp. *Historia lausiaca de Paladio* (420 p. Kr.), Vita Pachomii, "Vita Macarii" en *Patrologia Latina* 1879 LXXIII; *Historia monachorum in Aegypto*, en *Patrologia Latina*, 1878, XXI, 399.

La dezerto Tebaido ofte menciigis en la mezepokaj predikoj de la Dominikanoj kaj en la respondaj pentraj cikloj pri la "Dezertaj Patroj"

⁹ Kp. Vittore Branca (edit.), *Decameron*, supre cit., p. XIII; Branca, V., *Boccaccio medievale*, Firenze 1970; Sansoni, p. 148. Dekamerono mencias la urbon Tunizon en la noveloj IV-4 kaj V-2, kaj la egiptan urbon Aleksandron en la noveloj I-3, II-6.7.9, VIII-2 kaj X-9.

La orfa nepino de izraelida reĝo, kiam ŝi fariĝis 12-jaraĝa, petis de sia avo la permeson izoliĝi en ermitejo fore en la dezerto por preĝi kaj laŭdi Dion pere de recitado de la psalmoj. La reĝo, mirplena, konsentis kaj tial ŝi retirigis en ĉelo, kie ŝi tage kaj nokte ĉantis la psalmojn. Ŝia voĉo estis tiel dolĉa kaj melodia ke birdoj alflugis por ĝin aŭskulti. Ne nur birdoj sed ankaŭ du maljunaj ermitoj kies ĉelo situis ne malproksime. Reveninte al sia ĉelo la du maljunuloj ne plu kapablis preĝi, tiom arda estis la ampasio kiu ekflamis en ilia koro por la ĵus alveninta ermitino. Amorfrenzeziĝinte, ili decidis ekposedi ŝin per insido. La postan tagon ili revenis al ŝia ĉelo kaj dum horo manĝis kaj babilis kun ŝi. Poste, kiam ŝi estis leviĝonta, ili sursaltis kaj kaptis ŝin. Ŝi tute ne perdis sian aplombon, ŝi eĉ ŝajnis ke ŝi delonge atendadis tiun momenton. Ĝuste pro tio ŝi petis sian avon, la reĝon, ke li konstruigu tiun ermitejon por ŝi. "Kiu el vi du volas kiel unua amori kun mi? Bonvolu tamen atendi momenteton por ke mi preparu la kuŝejon, min lavu kaj parfumu". La du ermitoj preskaŭ ne kredis siajn orelojn. Ili ŝin liberigis kaj pretis atendi. Enirinte en sian ĉelon, la reĝnepino tuj riglis ĝian pardonon, kaj, suprenirinte sur la tegmentan terason, ŝi komencis mal-

beni kaj skoldi ilin. La du, memkompreneble, furioziĝis kaj, post vanaj provoj disrompi la pardonon, ekiris al la ĉefurbo, kun la intenco ŝin kalumnii antaŭ la reĝo. *Anstataŭ preĝi kaj laŭdi Dion, tiu juna virino, via nepino, profitis de foresto de ĉia kontrolo por senhonte malĉasti kun fremdaj junuloj.* Ili ja estis fidindaj atestantoj. La povra avo-reĝo konsterniĝis je tiu denuncio kaj jam decidis ŝin ekzekuti sur brulŝtiparo. Sed jen ses junuloj kiuj alportis la ŝtipojn lin konvinkis pli atente pridemandi la du denuncintojn. Fakte la du ermitoj, pridemandite unu post la alia, evidente kontraŭdiris sin reciproke. Malkaŝinte ilian kulpon, oni ilin kondamnis kaj tuj ekzekutis sur brulŝtiparo. Ekde tiam la malnaiva juna ermitino povis sin senĝene dediĉi al la servo de Dio.

3. Volante kompari la dekaameronan novelon pri Alibek kun la supre resumita epizodo de la araba novelo *Rakonto de la kranio kaj de la reĝo* oni tuj rimarkas ke en ambaŭ la scenejo estas tute egala: malproksima dezerta teritorio kiu gastigas tie kaj tie la ĉelon de ermito, ĝuste kiel la dezertoj Tebaido kaj Sketo priskribitaj en la *Vitae patrum* (Vivoj de la egiptaj sanktaj Patroj).⁸

Ambaŭ heroinoj ĵus eniris puberecon sed jam flegas fortan deziron sin konsekre al Dio en plena soleco laŭ la asketaj idealoj de la frua egipta ermitismo kiuj ekde la 13^a jarcento impete refluas en tuta Eŭropo.



Ambaŭ renkontiĝas, dum sia strebado al spirita perfekteco, kun monaĥoj. Por la reĝnepino de la araba rakonto tio okazis kontraŭvole. Male Alibek serĉas la kontakton kun la celo iniciĝi al asketismo.

Post tiaj premisoj, la du noveloj diametre diverĝas. La reĝnepino, superinte komencan konfuzon, reagis malvarmsange kaj, per neantaŭvidita malico, eskapas el la manoj de siaj insidantoj. Male la junulino Alibek fidis je la monaĥo Rustiko kun subiĝema kaj provoka naiveco. La du maljunaj ermitoj

de la *Rakonto de la kranio kaj de la reĝo* montriĝas perversaj kaj insidemaj. Male nur la tria monaĥo de la itala novelo pekas, kaj tio pro malprudento kaj tromemfido.

Ne estas tro aŭdace supozi ke Bokaĉo kaptis ian eĥon de la menciita epizodo de la araba novelo en Napolo. En tiu ĉi urbo li pasigis la jarojn de siaj juneco kaj kleriĝo, de kiam li estis 15-jaraĝa ĝis kiam li fariĝis 27-jaraĝa (1328-1340). En la epoko de reĝo Roberto el Anĵuo, Napolo ne nur estis gravega politika, kultura kaj ekonomia centro de Italio, sed ankaŭ unuaranga emporio kaj staplaro en kiun konverĝis homoj, varoj kaj ideoj de la tuta mediteranea areo, precipe de norda Afriko.⁹

Oni devus do almenaŭ parte fidi la prinoton kiun Bokaĉo lokas je la fino de la novelo. Laŭ ĝi la pro-

verbo *La plej plaĉa servo farebla al Dio estas remeti la diablon en infernon* iam transpasis la maron ĉi-flanken kaj ankoraŭ estas dirata en Napolo. Mi opinias male ke de transmare alvenis al Napolo nur la supre indikita epizodo de la *Rakonto de la kranio kaj de la reĝo*. Laŭ tiu ĉi perspektivo, Bokaĉo intence renversis la malnaivan ĉastecon de la heroino de araba novelo en la nekonscian voluptavidon de la juna nordafrikanino Alibek. Tion farante, per materialo veninta de islama lando, Bokaĉo prezentis al ni plian ekzemplon de ironia kaj malsanktiga parodiado de rakontaj motivoj tipaj de la siatempa monaĥa tradicio kaj de la pentofara kulturo kiun tiam antaŭenpuŝis la predikaj ordenoj. ❀